

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 6/1986 ★ Kr 8,50

## **Bonvenon al Nordia Renkontiĝo en Bengtsfors**



**3.-5. oktobro salutas la juna  
kluba estraro**

**De maldekstre: Carl-johan F, vic-  
prezidanto, Martin H, kasisto,  
Annelie L, sekretarino, Ulrika K  
prezidanto kaj Stina L.**

**Esperanto-Tago la 27-an de  
septembro**

**La "ŝlosilo" nun estas preta!  
Plupo-libroj nun en esperanto**

## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.

**Medlemsavgift:**  
Direktansluten medlem 75 kr  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
Kvintinto. Om du inte får den, med-  
dela födelseår till Esperanto Centro.

## Esperantoförlaget

Postadress:  
Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:  
Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept. - 15 maj:  
onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommarén.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:  
Anita Lindblom.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-  
bundet

Adress: EsperantoCentro  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel  
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist  
Västermov. 19, 732 00 Arboga  
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,  
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng  
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:  
EsperantoCentro, Stockholm 1986



## SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-  
pero)  
Västermov. 19, 732 00 Arboga,  
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom  
(kansliet, medlemsfrågor)  
Mariehamngatan 18  
163 27 Spånga  
Tel 08-751 73 79

Kassör: Börje Andersson  
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde  
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha  
Andréasson, (SEF-årskongresser)  
PI 2265, 425 00 Hisings Kärra  
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin  
(turnéer, bibliotek)  
Ringv. 11 B, 579 00 Högsby  
tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin  
(massmedia)  
Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,  
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin  
Jordbrogatan 57  
603 64 Norrköping  
tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin  
(massmedia)  
Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,  
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson  
(utbildning, nordiskt samarbete)  
Södra Rörum, 242 00 Hörby  
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt  
Lindquist  
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel  
0589-155 31

Utgivningsdatum för *La Espero* 1986: ca 31/1, 28/2, 30/3, 30/4, 15/6,  
15/9, 15/10 och 30/11.

Manuskript till tidningen skall vara redaktören tillhanda senast en  
månad före utgivningsdatum. Manuskripten skall vara maskinskriv-  
na med dubbelt radavstånd, helst inga förkortningar. Bokstäverna  
skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall vara av en sådan  
kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta dem.

Annonspriser i *La Espero*:

1/1-sida	kronor 1 200
1/2-sida	kronor 725
1/4-sida	kronor 425
2 spalter x 6 cm	kronor 250

## Nova UEA-peranto

Asta Schaedel eksigis la 1-an de oktobro kiel UEA-peranto, pro persona  
kialo. Ŝi kun lerteco plenumigis tiun oficon dum kelkaj jaroj. Ni kore  
dankas ŝin.

Lisbet Andreasson prenos sur si tiun laboron. Ŝi jam multe scias pri tiu  
tasko, ĉar kiel multaj esperantistoj certe memoras, ŝia patrino Ester  
Andrén dum multaj, multaj jaroj estis peranto de UEA.

Do, ek de la 1-a de oktobro turnu vin al Lisbeth Andreasson, Södra  
Rörum, 242 00 Hörby, tel 0415-501 52 kiam koncernas UEA kaj Uk  
dandojn.

Sendu la diversajn kotizojn kiel antaŭe al postgiro 14 74 29-5, Es-  
perantoförbundet, specialkonto.



Hur många "Esperanto-  
främjare" har DU skaffat  
under året?



## INNEHÅLL/ENHAVO

- 76 Diabildserien...  
Proksimradiaj in-  
formsonbendoj!  
Varsovio venonta!
- 77 Esperanto en CISV  
FN akceptis espe-  
rantajn proponojn  
Kanhända ett sätt
- 78 Donacoj  
La signifo de "kom-  
puti"
- 79 Märtha Andreasson  
raportas pri Pekino
- 80 Hjälp hitta citat  
Kongresaj rezolu-  
cioj  
Esperanto - invand-  
rarspråk!
- 81 Esperanto-nyckeln  
klar
- 82 TRA LA LANDO
- 84 Svedoj ĝuis hun-  
garajn tagojn...  
Nova Esperanto-  
Akademio
- 85 Plupo-libroj nun  
en esperanto  
Merkatoj bonaj  
propagandejoj
- 86 Franca esp-grupo  
bezonas helpon!  
Esperanto-Centro  
Paderborn ...
- 87 Nya bokpriser  
Nekrologoj  
Interesa seminaro  
en Bad Saarow
- 88 Nya årsavgifter  
1987  
Korespondpetoj  
Televizia e-kurso

## Prezidanto:

Post la someraj esperantaj travi-  
vaĵoj (kaj ankaŭ neesperantaj!),  
kiam la motivigo okupi sin pri es-  
peranto kreskis kaj kiam ni espe-  
reble akiris novajn fizikan kaj psi-  
kan fortojn, estas tempo plani por  
la aŭtuna esperantolaboro. Mi  
aŭdis ke kelkaj kluboj jam planis  
por aktiva, ampleksa informado  
al neesperanta publiko.

\*

Plej proksime nun estas la **esperantotago** la 27-an de septembro kun la sekvonta semajno. Mi esperas ke ĉiuj kluboj kaj unuopaj esperantistoj faros sian plejblon informi pri esperanto.

\*

La 2.-4. de oktobro ni renkontiĝos en Bengtsfors, ĉu ne? Tiam okazos la **Nordia Renkontiĝo tie**. La juna esperantoestraro en Bengtsfors salutos nin kore bonvenaj, kaj esperas ke ni venos multnombre. Speciale grave estas ke ankaŭ gejunuloj partoprenos ĉar la temo estas "esperanto en la lernejo" kaj ni volas montri la reprezentanto (j)n de SÖ ke la juna generacio ankaŭ interesiĝas pri esperanto.

\*

Nia laboro en la estraro koncentriĝas nun pri la jubilea jaro. Ni devas utiligi la 100-jariĝon de esperanto, petante, eĉ postulante favoron al esperanto ĉe diversaj instancoj.

Ni establis kontakton (denove, ĉar jam okazis kelkfoje) kun SÖ kaj aliaj lernejoj. Ni ĵus



nun preparas materialon por lernejoj, prezentante esperanton en la kadro de paco kaj internacia edukado.

Ni kontaktis la svedan televidon por oferti tiun esperantan kurson, kiun la jugoslava televido produktus, se aliaj landoj ekonomie kunhelpas. Estas la eminenta sinjoro Tibor Sekelj, kiu instigas tiun gravan laboron.

Pli malfrue aŭtune ni aranĝos informan renkontiĝon kun parlamentanoj, kiuj iam montris siajn interesojn por esperanto. Ĝi okazos espereble en la parlamenta domo kun helpo de nia membro Ingemund Bengtsson.

\*

Jam en novembro numero de La Espero ni informos pri la jubilea kongreso en Stokholmo la 10.-13. de aprilo 1987 kaj jam tiam estos ebleco aliĝi al la kongreso.

\*

Ne forgesu nian celon — ke ĉiuj svedoj scias pri esperanto antaŭ la jubilea jaro.

Karin Lindquist

## Diabildserien: Dags att beställa...

Vid den enkätundersökning som gjordes under Örebro-kongressen, fanns ett stort intresse för en diabildserie om esperanto. SEF beslöt då att ta fram en serie i 20 exemplar.

Serien består av 25 bilder och till dessa ett ljudband med till bilderna hörande texter, samt ett manuskript för dem som vill prata själv.

Uppläggning av bilderna är sådan att relativt tidigt ges en information om esperantos dagsläge. Sedan följer en målgruppsnedbrytning – information där alla ålderskategoriers möjligheter inom esperantorörelsen tas upp.

De olika internationella sambanden har också kraftigt poängterats, så att serien också skall lämpa sig som informatin till internationella organisationer, skolor m fl.

Riksdagens talman, Ingemund Bengtsson, har varit vänlig nog att ställa upp med ett personligen intalat avsnitt.

När informationskommittén började arbeta med bilderna, visade det sig snabbt att det var mycket mera arbete än vi kunde tänka oss. Trots detta har vi kvar målsättningen att få den klar till Esperantodagen den 27 september. Om inga externa leverantörer "krånglar" hoppas vi att vi skall lyckas med detta.

Priset för diabildserien med ljudband och manuskript är kronor 325:–. Sänd beställning snarast till EsperantoCentro, Brunns-  
gatan 21, 111 38 Stockholm,  
tel. 08-11 74 34.

**Bernt Lindquist**  
informationskommittén

## Proksimradiaj informsonbendoj!

Kelkaj kluboj jam sendas informajn programojn pere de proksimradio – närradion. Por ke ne ĉiuj kluboj bezonu prepari siajn propajn programojn, SEF decidis ellabori kelkajn sonbendojn. Harold Brown afable prenis sur si la taskon cerbumi pri la enhavo. Laŭ nia plano la bendoj estos pretaj en septembro. Pliaj praktikaj informoj ni sendos rekte al la kluboj.

Ĉi sube Harold prezentas sian ideon:

Dek kvin-minutaj programoj estas en preparo por uzo en "närradio". La programoj celas prezenti fonajn, argumentojn favorajn al esperanto, kune kun lingvaj ilustraĵoj por montri kiam-

niere esperanto gajnas per havi racian, regulan gramatikon.

La dek programoj estos registritaj sur unu bendon. Ĉiu programo estos memstara kaj taŭga por uzo aŭ sola aŭ kiel unu el serio. La programoj povos esti elsenditaj po unu monate aŭ semajne aŭ eĉ tage, se ekzemple oni dezirus subteni lokan kampanjon aŭ esperantan semajnon. La serio konsistigos "kurantan reklamadon", kiun oni povus ripeti pli ol unu fojon en la jaro, ĉar la enhavo estos ĉiam valida kaj ĝisdaŭra.

La bendo ne estos kurso por instrui la lingvon. Ĝi simple celas al doni pozitivajn informojn por ke la publiko ricevu en la menson

## Varsovio venonta!

Jam venis aliĝilo al la jubilea kongreso en Varsovio 25 julio–1 aŭgusto 1987.

Aŭtobuse al Varsovio

Same kiel pasintjare al Augsburga ni arangós aŭtobusan vojaĝon al la kongreso en kunlaboro kun Nord/Syd Resor. Kaj ili promesas saman komfortan aŭtobuson kaj samajn lertajn gvidantojn kiel al Augsburga.

En la venonta numero de La Espero ni informos pri la diversaj kotizoj kaj pri la vojaĝo.

## Böcker kilovis!

Vi säljer donerade böcker i paket om 3 och 5 kilo. Sänd 123:- respektive 188:- kr till postgiro 2012-3, SEF och skriv *bokpaket* på talongen. Ni berikar ert bibliotek eller ordnar auktion på klubben och hjälper samtidigt SEF.

faktojn kaj solidajn argumentojn anstataŭ mitojn kaj antaŭjuĝojn.

La bendo celas esti helpilo al lokaj grupoj, kiuj uzu ĝin en närradio propravole.

Dumtempe venis sciigo ke ankaŭ Karl M Blomvist de la Motala klubo ellaboris proksimradiajn sonbendojn – legu la prezentadon de Runo Stridell, kiu ankaŭ donas kelkajn sugestojn pri la uzado de la bendoj. Ĉar tiuj bendoj enhavas ĉefe esperantan kurson ili kompletigas la SEF-ajn bendojn, kiuj ĉefe enhavas informojn pri esperanto!



---

# Esperanto en la kampeto de C.I.S.V inter la 9-a kaj la 22-a de junio

En la pacnumero de "LA ESPE-RO" (numero 3, 1986) vi povis legi pri la internacia asocio C.I.S.V (Children's international summer villages). La eventuala kunlaboro pri kio oni skribis, rezultis en praktiko. La junaj esperantistoj en Stokholmo ricevis proponon kunlabori en iliaj infanvilaĝoj. Mi mem tre interesiĝis pri tiu okazo montri esperanton al infanoj kaj do mi aliĝis al tio.

C.I.S.V organizas multajn diversajn kampojn por junuloj ekde 11 jaroj. Unu tia kampo estas la "kampeto", kiun mi sekvis. Ĝi estas por enmigrintaj kaj svedaj infanoj de 11 jaroj. Dum du semajnoj 18 infanoj kaj 6 gvidantoj estis kune en kampara ĉirkaŭaĵo. Do, mi ricevis la ŝancon prezenti esperanton dum tiuj tagoj, precipe unu tago kiam mi rakontis pli detale kaj iomete instruis.

Ĉu mi bone faris mi ne scias, sed post la kampeto ĉiuj partoprenantoj almenaŭ sciis ke esperanto ne estas nacia lingvo kaj ke ĝi iel helpas al la internacia kompreno.

Mi esperas ke tio estis la enkonduko al daŭriga kunlaboro en la kampoj de C.I.S.V.

Berit Posthuma

---

## FN akceptis esperantajn proponojn

Raporto de Yngve Nilsson, kiu estis la reprezentanto de Svenska Esperanto-förbundet, pri la kongreso de Svenska FN-förbundet, en Uppsala 31-an de majo – 1-an de junio 1986.

Svenska FN-förbundet, kiu havas 140 lokajn societojn kaj 144 aliĝintajn tutlandajn organizojn, inter ili Svenska Esperantoförbundet, kongresis en Uppsala.

Je la inaŭguro parolis la ministro Anita Grandin. Kiel nova federacia prezidanto estis elektita Karl-Erik Svartberg, sociademokrata parlamentano de Partille.

FN proklamis la jaron 1987 kiel internacia loĝeja jaro kaj 1988 FN, kune kun aliaj popolmovadoj, speciale laboros por homaj rajtoj ĉar tiam estas 40 jaroj de kiam la ĝeneralasambleo de FN prenis la ĝeneralajn deklaraĵojn pri homaj rajtoj. Tio okazis la 10-an de decembro 1948.

El la 44 proponoj, kiujn la kongreso traktis, du temis pri Esperanto. Unu proponon sendis la FN-societo en Ljungby, duan sendis Svenska Esperantoförbundet. Ambaŭ proponis, ke la organizo diversmaniere subtenu Esperan-

ton. La kongreso unuanime, sen diskuto akceptis la rekomendon de la asocia estraro, ke la organizo.

"esprimas sian subtenon al daŭra evoluo de Esperanto, admonas la FN-societojn kaj distriktojn esplori kaj studi la eblojn en plia amplekso uzi Esperanton en la laboro por internaciaj rilatoj".

Svenska FN-förbundet estas membro de la tutmonda federacio de UN-societoj (FN-societoj) WFUNA. Tiu federacio jam antaŭ kelkaj jaroj akceptis rezolucion favore al Esperanto.

---

## Kanhända ett sätt föryngra våra klubbar

Vi börjar väl alla lite till mans att bli bekymrade över den höga medelåldern i våra klubbar. Inte så att det skulle vara något fel på de äldre medlemmarna. De har gjort och gör allt fortfarande sitt för klubbens sammanhållning, men vi lever ju inte i evighet. Hur går det med klubbarna den dag, då de gamla inte längre finns kvar? Esperanto är ännu under överskådlig tid beroende av klubbarna som medium för sin tillvaro.

Ett litet hopp tändes idag, när jag hade tillfälle att avlyssna ett par radiolektioner, som Karl M Blomkvist framställt för användning i närradion. Lektionerna grundar sig på SEF:s lilla korrespondenskurs på sex lektioner, som genomföres av Karl Blomkvist och en elev.

Ett lyckligt resultat vilar huvudsakligen på informationen om kursen. Man kan tänka sig annonsera i närradion upprepade

gånger i god tid före kursens början. Vidare kan artiklar och annonser införas i de mest spridda dagstidningarna i kommunen. Information bör spridas särskilt till skoleleverna exempelvis med upplysning om att kursbrevet kan afhämtas hos studierektor före kursens början. Klubbmedlemmarna kan naturligtvis också försöka att

## Granda donaco al SEF kaj UEA

Nia multjara membro **Sven Sundin**, Växjö donacis 118 akciojn en Custos AB, kiuj post vendo enspezigis 17.343 kronojn. Laŭ la deziro de la donacinto la mono dividas inter SEF, UEA kaj Esperantoeldonejo laŭ jene:

SEF	7.671 kr
UEA	7.672 kr
Eldonejo	2.000 kr

Sven Sundin volas ke ni (SEF) uzu la monon por informado antaŭ la jubilea jaro, kaj ni povas aserti ke ĝi estas bezonata kaj ni estas tre dankema kaj ni ankaŭ estas certaj ke kaj UEA kaj la Eldonejo kun danko akceptas la donacon.

## La signifo de "komputi"

personligen påverka ett antal personer att delta i kursen.

Kursdeltagarna bör få sina brevsvar rättade av den lokala kursledningen, som på detta sätt också får reda på vilket gensvar som kursen röner.

Detta experiment kommer att starta i september 1986 i Motala, men liknande aktivitet borde med närradios hjälp kunna igångsättas även på många andra orter, där närradiosändare finns.

Kursinnehållet ger sig självt genom användning av SEF:s korrespondenskurs, och att överföra den till bandlektioner är ju inte alltför krävande. Den klubb som ändå tvekar, kan mot blygsamt vederlag förvärva kassettkopia av motalakursen genom att ta kontakt med Karl Blomkvist under adressen: Styvingevägen, 8 B, 591 34 MOTALA eller per telefon: 0141-509 42.

Det vore roligt, om det här förslaget kunde sätta lite fart på klubbarna nästa arbetsår.

Runo Stridell

En artikolo en "La Espero", n-ro 5, 1986, Bernard Golden asertas ke Antal Münnich enkondukis novan difinon de "komputilo" sen konsultado de aliaj fakuloj. Golden referencas al artikolo de Münnich de la jaro 1978. En tiu artikolo Münnich tamen eksplicite diras ke li konsultis aliajn fakulojn dum la laboro pri la kvinlingva komputika vortaro, kiu aperis en 1972. En la diskutoj en 1976 kaj 1978 oni uzis terminon "C-koncepto" por la koncepto difinita de Münnich jene: "Produkti datum(j)n, prilaborante alia(j)n datum(j)n per aŭtomato". Münnich ne estis la unua kiu uzis la terminon "komputi" pri la C-koncepto. En artikolo aperinta en "Akademiaj Studoj 1983", Heinz Dieter Maas diras, ke ĝis la apero de PIV, li uzis "komputilo" pri la C-koncepto, ĉar tiu termino estis jam vaste uzata pri tiu koncepto. Mi mem unue renkontis la vorton "komputilo" kun la klarigo "elektrona kalkulmaŝino" en artikolo en "Es-

## Donacoj

Al la aliaj donacintoj ni ankaŭ esprimas nian koran dankon:

### Klubo Cent:

Alice Hede-Gunnarsson, Kumla  
Karl-Erik Bergström, Arboga  
Erik Brenander, Kvänum, entute 300:—.

### Donacoj:

Jens Johansen, Degerfors 75:—

Karlstads Esperantoförening 100:—

Ulla Luin, Tyresö (som tack till Amy Nilsson för hennes samling kongressböcker) 200:—

Lennart Persson, Leksand 100:—

Einar Nilsson, Herrljunga 100:—

Margareta Hansson, Partille 10:—

### Al informado:

El poŝtgiro 16 36 07-5 2.000:—

### Klubo Cent Jaroj:

Tore Fors, Kävlinge 100:—

peranto" en majo 1966. La vorto "komputilo" por tiu koncepto do estis uzata kelkajn jarojn antaŭ ol PIV enkondukis la vorton "komputero" por la sama koncepto.

La vortoj "komputi" kaj "komputilo" por la C-koncepto definitive venkis. Aperis tri komputikaj vortaroj, ĉiu el kiuj uzas tiujn vortojn pri la C-koncepto. Aperas du revuoj por la fako, unu kun la titolo "Aktuala Komputiko". En la Jarlibro de UEA por la jaro 1985 estas multaj fakdelegitoj pri komputiloj, nur unu fakdelegito pri komputoroj kaj neniu fakdelegito pri komputeroj.

Olav Reiersöl



## Tre varman akcepton ni ricevis

Ni ricevis tre varman akcepton, kaj de la vetero, kiu kaŭzigis "riverojn da ŝvito", kaj de la ĉinaj esperantistoj, kiuj ĉiel helpis nin kaj ĉiam tre kore faris sian plej eblan por kontentigi nin. Tiun bonkoran kaj sentan varmecon estas unu el miaj plej agrablaj rememoroj de la kongreso en Pekino kaj de la ekskursoj al diversaj urboj suden kaj norden de la ĉefurbo.

### La inaŭguro de la kongreso

La inaŭguro okazis dimanĉe antaŭtagmeze dum prezido de Gregoire Maertens. De la kongresa lando partoprenis kaj salutis la kongreson pluraj personoj.

Post muzika paŭzo sekvis salutoj de diplomatoj kaj ambasadaĵ reprezentantoj, poste estis prelego de Humphrey Tonkin pri la kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo". Fine la prezidanto Gregoire Maertens dankis al ĉinaj reprezentantoj kaj al ambasadaĵ reprezentantoj, kiuj honoris nian kongreson per sia ĉeesto.

La inaŭguro komenciĝis per la himno "La Espero", kiun fiore kantis 70 bulgaraj kaj ĉinaj esperantistoj kaj ĝi finiĝis ankaŭ per la himno, sed nun ni ĉiuj kune kantis.

### La malfermo de la kongreso

Posttagmeze okazis la malfermo de la kongreso. Ĝi okazis en tradicia maniero kun salutoj al la kongreso de reprezentantoj de la diversaj landoj.

### La nova estraro konsistas dum la venonta 3-jara periodo el jenaj personoj:

US - Humphrey Tonkin, prezidanto kaj kunordiganto de la laboro de la movado, esplorado kaj dokumentado

J - Yosimi Umeda, vicprezidanto, kunordiganto de la agado en la aziaj landoj,

H - Flora Szabo-Felső, sekretario + interna agado

B - Gregoire Maertens, eksteraj rilatoj

F - Jean-Louis Texier, interna agado - faka, landa, informa, eduka, junulara

NL - Victor Sadler, financoj

F - Barbara Despiney, eksteraj rilatoj - Unescorepr.

I - Dickon Mastermann, interna agado

H - Otto Haszpra, faka agado - scienca fako

### La tago de la paco

Vendrede, la 1-an de aŭgusto, okazis la tago de la paco dum prezido de Yosimi Umeda kaj ĝi komencis 8.30 kun traktado de la kongresa temo. La unua okazo dum la kongreso diskuti la kongresan temon okazis samtempe kun kunsido de Komitato, kie oni elektu kaj estraranon kaj C-komitatanojn. Tio signifas, ke nur tiuj komitatanoj, kiuj same kiel mi kontribuis per prelegoj en la programo ĉeestis. Mia prelego havis la titolon "Virinoj kaj Paco". Estis 6-7 aliaj raportantoj pri pacagado. Posttagmeze okazis dua ĝenerala kunsido dum kiu ni traktis la kongresan temon. Vespere okazis en la Ĉina Teatro Internacia arta vespero kun pacokonzerto.

### Kulturaj kaj amuzaj programoj

La kulturaj programoj estis de tre alta kvalito, eble la plej alta ĝis nun en iu kongreso. Estis nacia vespero, folkloro vespero kaj internacia arta vespero. Ankaŭ la koncerto de la kanada kantistino Joëlle Rabu estis altkvalita. La teatraĵo "Virino, kiu flustras en uragano", estis bone prezentata, sed bedaŭrinde ne aŭdebla. Eble la salono estis tro granda por tiu teatraĵo. La kongresa balo okazis en pluraj etaĝoj en la Internacia klubo kaj ankaŭ ekstere sur la teraso.

### Internacia kongresa universitato

Kiel ordinare estis aro da prelegoj pri multaj diversaj temoj. Rektoro estis ĉijare Ye Junjian, eminenta ĉina verkisto. Estis 10 prelegistoj el 8 diversaj landoj.

### Faka agado

Ankaŭ ĉijare estis multaj fakaj kunsidoj - fervojistoj, medicinistoj, poŝtistoj, instruistoj, verkistoj, oomotanoj, bahaaistoj, k.t.p. kolektiĝis por diskuti komunajn aferojn. Monda Turismo kaj Mondpaca Esp. Movado ankaŭ kunsidis same kiel Kristana (KELI) kaj la skoltoj.

### Kursoj por komencantoj, progresantoj kaj pli spertaj

Ĉiutage okazis kursoj: Ĉe-kurso por komencantoj, progresiga kurso kaj konversacia rondo estis la diversaj eblecoj, kiuj prezentigis al la kongresanoj. Kaj multaj kaptis la okazon plibonigi sian lingvoscion.

### Ekskursoj

Eble oni povas diri, ke la Pekina kongreso estis pli turisma ol ordinare, pli ekskursiva. Estis multaj duontagaj ekskursoj al belaj lokoj en la proksimeco de la ĉefurbo. La plej belaj certe estis la Somera Palaco kaj la Imperiestra Palaco. La tuttaga ekskurso iris al La Granda Muro. Estis karavano de 50 aŭtobusoj, kiuj per helpo de polica eskorto rapide trovis la vojon. Sed ni ricevis nur 1 horon por promeni sur la Muro kaj provi atingi la pinton.

### Bankedoj

La Pekina kongreso ankaŭ estis kongreso de bankedoj. Feliĉe ke ni jam frue lernis manipuli la manĝbastonetojn, ĉar dum bankedo ni devis gustumi kelkfoje pli ol 20 diversajn pladojn. Estis bankedoj

## Hjälp till att hitta bra citat!

Ett av de projekt som det nu arbetas med inom Esperantoförlaget är att ge ut en skrift med godbitar ur esperantolitteraturen, korta citat som illustrerar olika finesser och möjligheter som språket ger. En nyans- och finess-samling.

En funktion med en sådan skrift kan vara att bemöta eller vederlägga fördomarna om att esperanto inte duger som språk, inte är nog levande, inte förmår uttrycka nyanser osv. På så vis kan den bli användbar i argumentationen för esperanto bland skeptiker.

En annan funktion är att den kan ge oss själva, esperantister, ny inspiration, öka intresset för vidare språkstudier, skapa entusiasm för vår esperantolitteratur.

Det här är ett arbete där var och en kan lämna bidrag. Gå alltså igenom dina böcker, leta fram bra citat, skriv ned dem och skicka till: **Jan Milld, Solhemsvägen 21, 137 00 Västerhaninge.** Ange varifrån citatet är hämtat: bok och sida. Alla bidrag är välkomna, och ju förr desto bättre!

preskaŭ ĉiutage, invitis la urbo Pekino, la turismaj agentejoj, la Radio Pekino, oomoto, krom la kongresa bankedo. Vere al ni ne mankis manĝo en Ĉinio.

### Finvortoj

Mi nun faris supraĵan raporton pri la pekina kongreso. Mi certe multon forgesis aŭ preterlasis. Ne eblas ĉion kunmeti. Hejmen mi portis ne nur belajn memorojn sed ankaŭ multajn adresojn, kiuj certe donos al mi multe da ĝojo en la estonto, ĉar tiamaniere la novaj ĝeamikoj ne estas tute for.

## Kongresaj rezolucioj

**La 71-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de 27 julio ĝis 2 aŭgusto, 1986, en Pekino, kun 2,482 kongresanoj el 53 landoj, esprimante sian kontenton, ke la kongreso ne nur estis la plej granda inernacia arango ĝis nun okazinta en Ĉinio, sed ankaŭ la plej granda Esperanto-kongreso ekster Eŭropo, konstatante, ke en Ĉinio kreigas nova potencialo de la nuntempa Esperanto-movado, gratulante aparte la ĉinajn esperantistojn pro iliaj multflankaj kontribuoj al la internacia Esperanto-movado ĝenerale kaj al la kongreso specife,**

*alvokas* al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj subteni laŭ siaj ebloj la movadon en Ĉina Popola Respubliko kaj en aliaj aziaj landoj, precipe per disponigo de rimedoj por praktika utiligo de la lingvo, *substrekas*, kunlige kun la supra alineo, la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fakaj kampoj, kaj

*reapelacias* al la landaj asocioj digne omaĝi la centjaran jubileon de Esperanto per organizado de apartaj jubileaj kunvenoj, aranĝoj, eldonaĵoj, ekspozicioj kaj aliaj agadoj.

## Esperanto – invandrarspråk!

Första veckan i juli ägde en enveckas esperantokurs rum i Karlskoga. En av lärarna, Lars Forsman på Karlskoga Folkhögskola tog initiativ till en integrerad kurs med deltagare från olika orter i Sverige samt invandrare bosatta i Karlskoga. Detta gav många fördelar. Det blev genast större motivation att tala esperanto. Eleverna kunde stödja varandra genom sina kompletterande kunskaper. Svenskarnas styrka är ju det egna språket, medan invandrarna har större erfarenhet av språkinläring, eftersom de redan har lärt ett eller flera språk förutom sitt modersmål. Dessutom uppstod en kamratlig kontakt och eventuella fördomar suddades ut.

Inför höstens kurser rekommenderar jag att esperantoklubbarna och aktiva esperantister söker kontakt med invandrarförningar och gemensamt annonserar integrerade kurser i esperanto. Kanske kommer ni där rent av att hitta personer som redan länge

kan esperanto och som kan ställa upp som lärare.

En av eleverna vid årets kurs i Karlskoga, Yonis Mohammed berättar varför han tycker att esperanto är viktigt för invandrare:

”För det första tycker jag att man kommer närmare varandra, man förstår varandra bättre och så gör man en tjänst för världsfreden.

Esperanto är ett lätt språk för de flesta folken i världen, man kan lära sig det på några månader och om man jämför med andra språk, t ex engelska, så har man läst det i många år och fortfarande har man svårigheter när man pratar.

Esperanto som ett andra språk i hela världen betyder att man kan bevara sitt modersmål.

Esperanto har en mycket stark relation till fred, en fred som vi alla väntar på och längtar efter.

Många människor tycker det är svårt att byta tangenter på skriv-



# Esperanto- nyckeln klar

## Beställ idag!

Den länge väntade omarbetade "Nyckeln".


Enstaka ex. kostar 15 kr

Paket om 10 ex. 100 kr

Paket om 100 ex. 400 kr

Portokostnad ingår.

Beställning görs helst via insättning av beloppet på postgiro SEF Stockholm pg 20 12-3 eller Eldona, Malmö, 578-5.



## Letervesperoj

Letervesperon organizos Esperanto-klubo en novembro 1986j. Ĉiujn leterojn kaj bildkartojn estos respondotaj.

Nia adreso: ESPERANTO-KLUBO, SDK, PARKOWA 6, 28-200 STASZOW, Polando.

maskinen och översätta böcker som finns till esperanto, men de tänker inte på eller vill glömma hur mycket pengar som går åt till vapenindustrin. (Jag bor ju granne med Bofors). Tänk bara på hur mycket som man skulle spara genom att lära utlänningar esperanto istället för att kosta på tolkar inom olika organisationer.

Jag tycker att ett stort steg till världsfred måste vara att uppmuntra människor att lära sig ett språk, som skulle ta bort alla språkbarriärer mellan människor."

Inga Johanson

## Malta poezio

*En ĉambregoj liberecaj  
trapasas la penso  
sur la flugiloj de l' futuro  
dum la ŝaŭmo lavglisas  
laŭlonge de la glasoj kaj de la ha-  
roj tritikkoloraj*

Ĉu vi rekonas vian ĉefurbon, svedoj? Tiuj ĉi supraj linioj estas parto de la poemo "Stokholmo, Violkoloraj ridetoj" de Charles Coleiro. Ĝi aperis en la nova poemaro "Antologio de maltaj poetoj", kiun esperantigis Carmel Mallia. La libro aperis en Zagreb en 1985.

La unuan duonon de la 168-paĝa libro plenigas du epopeoj. Dum Karm en "La mio kaj lia pretero" priskribas sian batalon por senco en la vivo kaj spirita lumo. Ĉio pendolas inter espero kaj haoso. Fine la poeto atingas klaron. En "La turka ĉefgalero"

Gananton Vassallo priskribas ribelon de maltaj remistoj kontraŭ la turkoj. La epopeo estas rakonto, do tute alispeca kompare al la unua.

Krome, kvardeko da maltaj poetoj de la nuna jarcento prikantatas la sorton de sia popolo, la vivon, la amon kaj aliajn temojn, kiujn poetoj kutimas trakti. Mi ne povas ne citi "La Poeton" de Anton Buttigieg: Simile al infano kiu blovas /sapovezikojn, jen kun emoci/ kreadas la poeto el neni; Mi ne povas prijuĝi la tradukon, ĉar la maltan mi ne dcias. Mi tamen povas atesti pri tio ke la rezulto estas belsona kaj donis al mi intereson pri la malgranda insulo en la Mediteraneo. Ekleginte la poemaron mi tuj sopiris tien. Tio



# TRA LA LANDO

## Myrtle Green prelegas en Svedio

Kiam vi ricevas tiun gazeton Myrtle Green jam startis sian turnevojaĝon tra la lando.

Si komncis en Malmö la 2-3 de septembro

kaj daŭrigis al Karlskrona la 4-an

En Högsby ŝi estis la 5-9 kaj en TEDU-regiono la 10-16 de septembro

En Falköping ŝi prelegas la 17-an de septembro,

en Skövde la 18-an

kaj en Gotenburgo la 19-an de septembro.

(Kial ne pliaj lokoj?)

Por tiuj, kiuj ne havas okazon aŭdi Myrtle ni lasas ŝin mallonge

---

sendube signifas ke mi rekomendas la poemon al ĉiuj, kiuj havas intereson pri literaturo aŭ kaj pri vojaĝoj.

Mi tamen iom bedaŭras ke mankas poemoj de pli malnovaj maltaj poetoj. La maltlingva poezio certe havas nur mallongan historion, sed verŝajne maltanoj antaŭe poetis en aliaj lingvoj. La lingvouzo de la tradukinto estas bona. Mi tamen povas menciigi unu eraron.

*Dankon pro* (p. 136) devas esti *dankon por*.

La libro estas eldonita kun ekonomia subteno de Sveda Esperanto-Federacio. Tial estas des pli rekomendinde ke multaj svedoj legos ĝin.

La prezo ankoraŭ ne estas preta.

Leif Norden form

rakonti pri sia interesa prelegotemo: **La insulo Sark:**

## Laboranto en Sark

Kelkaj personoj eĉ ne aŭdis pri Sark. Aliaj scias nur, ke ĝi estas insulo, kie oni ne rajtas uzi aŭtomobilojn, kaj kie la "Dame of Sark" iam regis. Se mi aldonas, ke sur tiu insulo eĉ ne troviĝas policisto, vi komprenos, ke temas pri nekutima loko.

Tre bela la insulo certe estas, kaj pro tio tre vizitinda. Sed la vera allogo estas la vivo mem, kiun oni ne povas sperti, kiel feriantoj.

La insulo havas sian propran parlamenton, kiu decidas pri preskaŭ ĉio, sed tamen agnoskas la britan reĝinon. Kelkrilate oni sentas tie, ke oni vivas en la antaŭa jarcento. En aliaj rilatoj, la vivo estas tre moderna.

Myrtle Green

## Suda regiono

## Veckoslutskurs 11-12 oktobro

**Tag chansen och kom med på en verkligt intressant veckoslutskurs. Södra Distriktet av SEF inbjuder till veckoslutskurs 11-12 oktobro på Östra Grevie folkhögskola (mellan Malmö och Trelleborg).**

Den här gången kan vi erbjuda utländsk gruppledare till dem, som vill träna konversation och grammatik samt få lite kännedom om ungerska författare, som skrivit originallitteratur på esperanto. Det är Ferenc Jaky från Ungern som kommer att ta hand om den gruppen. Som vanligt kommer vi

också att ha en grupp för nybörjare och en för dem, som redan deltagit i några veckoslutskurser eller en vanlig nybörjarkurs. Anmälan skall vara oss till handa **senast 27 september.**

**Vidare upplysningar hos Lisbet och Bertil Andreasson tel 0415-501 52.**

## Stort intresse för esperanto

På inbjudan av Höörs hantverks- och industriförening deltog Mel-lanskånes Esperantoklubb (f.d. Höörs) under fyra dagar i en jubileumsutställning i Höör. Utställningen av turistbroschyrer, tidningar, böcker och esperantobrev med stämplor lockade många mässbesökare att stanna upp. Flygblad, broschyrer eller 1:a brevet i brevkursen delades ut till ca 500 pers. och vi beräknade, att ca 1000 tagit del av vår information. Mässans invigning, som förrättades av prinsessan Christina, föregicks av en kortage i vilken Esperantoklubben deltog med banderoll. Samtliga, som tjänstgjorde vid klubbens monter, tyckte sig märka ett stort intresse för esperanto.

## Utställning i Ljungby

På biblioteket i Ljungby har Ljungby Esperantoklubb, La Guto, under fyra veckor, 20-23, haft en utställning om esperanto. Den bestod av 10 stora skärmsidor med affischer, böcker, vykort, kuvert och emblem. Dessutom fanns några fack med olika esperantobroschyrer och tidningar. 25 stycken av dessa hade intresserade lagt sig till med under utställningen.

Lisbet Andreasson



## TEDU- regiono

### Raporto

La somero ja kutime estas trankvila periodo rilate klubajn aktivecojn. Sed por Karlskoga kaj Norrköping tio estis tempo por grava esperantolaboro.

Karlskoga Folkhögskola okazigis esperantokurson por komencantoj inter la 30-a de junio kaj la 5-a de julio. La kurson gvidis Lars Forsman, kiu estas instruisto je tiu popolaltlernejo, kaj ĝi havis 12-14 partoprenantojn.

Tute neatendite la klubo en Norrköping ekhavis oferton sendi esperantokurson en Närradion (rimarku - ili ricevis oferton, ili eĉ ne devis peti pri tio!). Preskaŭ ĉiuj klubanoj havis liberton, tiam Mikael Hultgren tute brave prenis al si, kune kun kamarado, la taskon pretigi dum tre mallonga tempo, la kurson. Ĝi konsistas el ses eroj kaj estos sendata ek de la 30-a de agosto.

**Gunilla Sundholm**

### Fredsaktiviteter

I Motala kommer en serie fredssaktiviteter att ordnas i höst. Början sker på esperantodagen den 27 september, då 12 internationellt arbetande föreningar i orten på initiativ av esperantoklubben ordnar en fredssoaré med den internationellt kända polska konsertpianisten Elzbieta Glabowna och LIHKÖREN (Linköpings studentsångarförening) som främsta dragnummer. Elzbieta Glabowna är född 1944 i Krakow. Utbildad i Musikhögskolan i Krakow 1962-67 (med första pris). Konserterat i Sverige, Polen, Sovjet, Frankrike, Iran m fl länder. Pristagare i Chopintävling i Warszawa 1965 och Marguerite Longtävling i Paris 1967.

Därefter sker fredssaktiviteter i samtliga skolor under c:a en må-

## Uppskattad studiecirkel i brevskrivning

Studiefrämjandet i Motala har utarbetat en studieplan byggd på Postens välkända bok SKRIV BREV PÅ ESPERANTO och den första cirkeln, som pågått under vårterminen, har omfattat 20 studietimmar. I cirkeln deltog nio esperantister i olika åldrar. Bland deltagarna märktes tre från Lin-

köping. Som cirkelledare fungerade Ulf Ribers. I arbetet ingick även att skriva till några meningsfränder i olika länder och glädjande nog hann svar erhållas innan terminens slut. Man må hoppas att studieplanen kan komma till användning även på andra platser i vårt land.



Stående fr v Mikael Carlberg, Mats Engström, Sven Karlén, Ulf Ribers. Sittande fr v Nils Gustavsson, Inga Björkeby, Sigrid Åkesson, Märta Bernhard. Gunilla Tyrberg hade ej tillfälle vara med sista gången, när bilden togs.

nad och hela serien avslutas med en aktivitet i samband med FN-dagen, då lokala FN-föreningen och några andra fredsföreningar står för programmet.


## Okcidenta regiono

Falköpings Esperantoförening har lämnat in till Esperanto Centro ett knippe tidningsurklipp från febr-mars i år, vilket tyder på stor utåtriktad aktivitet. Sändningarna i närradion ger ju inte bara esperanto röst i etern utan också en permanent plats i lokaltidningarnas radioprogram.

## Stefan Mac- Gill besökte elever i Kungsbacka

En högstadielklass i Hålabäcksskolan hade i maj månad 4 språkdagar då man specialstuderade språk i allmänhet och esperanto i synnerhet. Eleverna har sedan en tid tillbaka läst esperanto enligt suggestopedimetoden under ledning av Inga-Lill Tyrefeldt. Språkdagarna avslutades med ett grupp-





arbeite på torsdagen och ett spännande besök av Stefan MacGill, som höll en heldags undervisning med många intressanta inslag.

Stefan MacGill har i maj deltagit på KEF-festivalen i Uppsala. Där presenterade han sketcher ur sin senaste bok: *Streč eč, Stečj-skeč'*

## Nova Esperanto-Akademio

En aprilo fondiĝis Internacia Akademio Comenius kun jura sidejo en sveda universitat-urbo Upsalo; jam pli ol 20 naciaj sciencaj akademianoj, uzantoj de l' internacia lingvo, aliĝis kiel membroj-fondintoj de ĉi tiu nova Esperanto-Akademio, kies prezidanto iĝis la iniciatinto, profesoro Paul Neergaard. La ĉefa celo de l' nova akademio estas prosperigo de Esperanto por praktika uzado en la sciencoj. (Adreso por informoj: Paul Neergaard, Gothersgade 158, DK -1123 Kopenhago K, Danlando).

El popola ĉinio n-ro 7/86

## Svedoj ĝuis hungarajn tagojn en Gyula, Abaliget

Svedaj esperantistoj ofte somere veturas al Hungario por partopreni allogajn aranĝojn en Gyula kaj Abaliget.

La pasintan someron Edith Köhler el Huskvarna, Ingrid Johansson kaj Börje Andersson el Skövde havis interesajn, gajajn tagojn en la du hungaraj urboj.

Gyula proksime la rumania limo havis sian 24:an Someran Esperanton Universitaton. Kiel ĉiam la programo estis ampleksa kaj varia. Zsolt Gyarmathy kaj liaj helpantoj sukcesis doni al la aranĝo bonan etoson kiu dank' al partoprenado el 9 landoj ankaŭ fariĝis vere internacia.

Inter la prelegantoj estis Ferenc Jaki, kiu en oktobro-novembro faros prelegvojaĝon inter svedaj kluboj. Ni, kiuj aŭskultis lin, povas certigi ke la svedaj esperantistoj aŭtune havos prelegojn kiuj estas veraj travivaĵoj. Interesan


temon elektis profesoro Marcetta, ano de Itala Esperanto-Akademio: La ideografia skribosistemo Vidaling.

Ekskursoj, urbaj promenadoj, orgenkoncerto kaj aliaj okazinta-

ĵoj havis ankaŭ spacon en la programo.

Ĉirkaŭ centoj da partoprenantoj estis en Gyula, kaj proksimume la sama nombro vizitis la Internancian renkontiĝon Naturamikan en Abaliget en suda Hungario.

**Börje Andersson**



Gyula proksime la rumania limo havas mirindan allogon – varmajn termal-banejojn. En la baseno sur la bildo estas malpermesite naĝi. La baniĝantoj sidas aŭ staras kaj ĝuas la preskaŭ 40-gradan akvon. Tiamaniere reŭmatismo malaperas... (Foto: Skövde Nyheter).



# Plupo-libroj nun en esperanto


PLUPO, tiu de infanoj amata etulo, kiu loĝas fore en la nordo inter altaj montoj, nun povas fariĝi konata en multaj landoj, ĉar nun aperas 3 el la PLUPO-libroj en esperanto. Pro la montega blovado PLUPO havas distaŭzigitajn harojn, kiuj estas blujaj, kaj la nazo estas ruĝa de la freŝaj vintraj ventoj. Ĉiuj bestoj estas amikoj al PLUPO, kun ili li povas paroli.

La rakontoj pri PLUPO estas skribitaj de la aŭtorino Inga Borg, kiu ankaŭ faris la plaĉajn kaj belkolorajn bildojn, kiujn oni trovas sur ĉiu paĝo. Temas multe pri la sveda montegaro, pri ĝiaj bestoj kaj plantoj dum diversaj sezonoj. La novaj libroj, tri diversaj, temas pri la aventuroj kune kun la gruoj, kun kiuj PLUPO veturas al Afriko, pri vojaĝo sur la maro kaj pri la amikaj rilatoj al la lupoj.

Kombinante objektivajn informojn kun streĉaj kaj fantaziigaj punktoj Inga Borg volas ĉe la infanoj krei komprenemon por kaj scioj pri la bestoj kaj plantoj kaj interesigi ilin por la ekologiaj interrilatoj kaj ankaŭ komprenigi al ili la minacon de la moderna

Inga Borg

## PLUPO kaj la gruoj



socio kontraŭ la fundamentaj vivkondiĉoj. ton al tiuj PLUPO-libroj en esperanto.

La novestablita sveda K/B Progreso Eldonejo ricevis la eldonraj-

Por informo kaj mendo kontaktu Ulf Ribers, Norra Freberga, 591 90 Motala.

## Merkatoj bonaj propagandejoj

Partoprenu dum lokaj merkatoj kaj propagandu por esperanto! Skövde Esperantoklubb donas ekzemplon, ĉiujare partoprenante dum la "Helénsmerkato". Homoj viciĝas antaŭ la verda banderolo, aĉetas lotojn kaj ekhavas broŝurojn kaj informojn. La klubprezidanto Gunnar Olsson kaj Karl-Erik Olsson dum 6 horoj deĵoris kaj fervore propagandis.





## La franca esperantogrupo de Chambéry bezonas helpon!

Post plurmonataj klopodoj ĉe nia urbestro por ke nia urbo Chambéry honori Zamenhof, nia E-Grupo sukcesis. La 9-an de junio, nia urbestro oficiale, kaj unanime, decidis ke skvaro nomiĝos: "Square docteur Zamenhof".

La inaŭguro okazos, verŝajne, dum septembro kaj, propagandecle, ni dezirus ge ĝi estu la plej eble solena. Ni pripensis plurajn farindaĵojn por tiu inaŭguro inter kiuj solena transdono, al la urbestro mem, de amaso da gratuletoj alveninte el diversaj partoj de la mondo.

Jen kiel ni bezonas helpon. Skribu, ĉu propranome, ĉu nome de via E-Grupo, gratulleteron al

nia urbestro por la decido honori Zamenhof en Chambéry, adresante ĝin al:

Urbkonsilio de Chambéry  
pere de  
Raymond Boré  
481, rue de Bertillet  
F-730 00 Chambéry  
Francio

Kompreneble ju pli da tiaj leteroj ni povos amase transdoni, des pli la "imagrapo" estos forta. Gesamidenoj helpu nin! La tuta E-Grupo de Chambéry, simple sed sincere, antaŭdankas vin.

El Monato n-ro 6/1986

## Wanda Zamenhof estas bofilino!

Eugen Rytenberg afable atentigis nin pri eraro en la artikolo pri Wanda Zamenhof en la numero 5/1986 de La Espero.

Ŝi estis bofilino de Ludoviko Zamenhof – ne bofratino kiel ni skribis en la rubriko.

La redaktoro

## Biblioteka asocio

Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio baldaŭ komencos la trian jaron de sia ekzisto. Ĝia laboro estas plurflanka: la Asocio kunligas kaj servas tiujn esperantistojn, kiuj profesie laboras en ĉiaspeca biblioteko; same ĝi kunligas kaj servas la posedantojn kaj prizorgantojn de esperanto-biblioteko aŭ esperanto-kolekto nacia, internacia, privata, aŭ tute persona. Trie, ĝi laboras por la diskonigo de Esperanto inter la neesperantista bibliotekistaro.

Revuo. T.E.B.A. ĵus aperigis la unuan numeron de sia Biblioteka Bulteno kiu fine aperos kvaronjare. En ĝi aperas artikoloj interesaj por ĉiu libroamanto, aktualaj informoj bibliotekaj, rubriko terminologia, kaj foje recenzoj.

T.E.B.A. urĝe bezonas pliajn membrojn por efektiviĝi ĉiujn servojn. La jara kotizo estas £5.50, Dolaroj 8.00, DM 22.00 aŭ egalvaloro, ĉe unu aŭ alia el la sekretarioj. Ankaŭ ĝenerala informilo estas senpage havebla.

T.E.B.A.  
Esperanto-Centro, 140 Holland  
Park Avenue, London W11, 4UF,  
Britujo.

## Esperanto-Centro Paderborn kun du profesiaj Esperantistoj

Ek de la 1:a de aŭgusto 1986 la direktoro de la Esperanto-Centro Paderborn, Hermann BEHRMANN, estas profesia Esperantisto. Por du jaroj li liberigis de la instruista profesio en elementa lernejo. Lia kunlaboranto Drago SMOLIC jam de Februaro 1983 kiel profesia Esperantisto laboras en la Esperanto-Centro.

Tra la tuta jubilea jaro 1987 Hermann Behrmann planas pliajn preleg-vojaĝojn tra Germanio kaj la najbaraj landoj, kaj

krome li organizos kelkajn pliajn vojaĝojn (karavanojn) al Ĉinio, por utiligi la akiritajn vojaĝ-sperojn kaj la akiritan scion de la ĉina lingvo.

La venontaj Ĉinio-vojaĝoj okazos 23.10–7.11 86 (6080 DM), 29.10–14.11 86 (5790 DM) kaj 20.12.86–3.1 1987 (5095 DM).

Interesuloj laŭeble frue petu detalan informilon ĉe Esperanto-Centro, D-4790 Paderborn, postfako 1450; tel. 05251-276 12.

### En la lernejo.

— Se mi diras: "La knabo donis", kiu tempo estas?

— Pasinta tempo.

— Guste. Kaj kiam mi diras: "Via patro havas monon", kiu tempo do estas?

— Ĉirkaŭ la unua en la monato.



## NYA BOKPRISER

Under ett par år har Esperantoförlaget tillämpat en prismodell som inneburit att portokostnad tagits ut separat. Det har visat sig att våra kunder vid beställning via postgiro mycket sällan kommit ihåg den separata avgiften. Resultatet har alltså blivit att vi fått betydligt lägre rörelseresultat än förlagets styrelse räknat med. Vi överger därför denna modell och återgår till den tidigare, där kompensation för porto bakas in i priserna direkt.

Från den 1 oktober höjs förlagets priser med i genomsnitt 6 % för att kompensera ökade portokostnader under 80-talet. För enstaka böcker innebär detta en prishöjning på mellan 3 % och 10 %, beroende på bokens pris. Variationen beror på att vi avrundar till jämnt kronantal och tar ut en lägre procentsats för de dyraste böckerna. Priset står ju inte alltid i relation till bokens vikt, i motsats till portot.

En ny bokkatalog beräknas vara framme till den 1 oktober och kan beställas genom insättning av 5 kr på postgiro 20 12-3.

Samtliga klubbar kommer att så snart som möjligt få ett ex. av katalogen.

En påminnelse till bokbeställare: Vi tjänar alla på om större beställningar görs.

### Rabatt

— vid köp av 10 ex av en bok eller för sammanlagt minst 500 kr: 10 % på egna utgåvor och 5 % på övriga.

— vid beställning till adress utanför Europa och Nord-Amerika: 50 % på egna utgåvor.

— **Varför inte ägna en klubbkväll till att göra en gemensam bokbeställning?**

## Nekrologoj



### Veselin Damjanov

Veselin Damjanov (1925-1986) forpasis meze de aprilo en Bulgario. Li estis vaste konata tra la mondo kiel profesia kantisto, kiu ofte aperis antaŭ la esperantista publiko. Li estis profesoro pri kantado en Duonsupera Fako pri Estrada Muziko ĉe Bulgara Ŝtata Konservatorio.

Li prezentis en Esperanto unuafoje en la 59a Universala Kongreso en Hamburgo, kie li fariĝis entuziasma adepto de la lingvo.

Al lia populareco kontribuis ankaŭ liaj gramofondiskoj en Esperanto. Li aŭtoris dudekon da

kantoj laŭ originalaj tekstoj de Esperanto-poetoj.

Pasintjare Veselin Damjanov vizitis Svedion kaj ĝuigis nin per sia belkanto.

### Teo Jung

Teo Jung forpasis la 12-an de majo en Scheveningen (Nederlando). Tiam li estis 93-jara. Por ĉiuj esperantistoj li estas tre bonkonata. Li inter alie fondis "Heroldo de Esperanto", verkis multajn artikolojn, poemojn, rakontojn kaj en 1979 aperis lia fama libro "Ĉiu ĉiun". Teo Jung estis membro de la Lingva Komitato kaj membro de la Akademio de Esperanto.

## Interesa seminario en Bad Saarow en novembro

**Internacia seminario pri historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado: 10. - 15.11.86.**

La seminario traktu historiajn kaj sociologiajn faktojn aparte sub metodologiaj vidpunktoj. Ĝi stimulu al pluj esploroj, konsciigo la movadajn gvidantojn pri la graveco de la traktataj temoj. Pri la historio de la movado kaj ĝia nuna konsisto ni devas scii pli multe. Do ekzistas multaj temoj por pritrakti sub la aparte bonaj kondiĉoj en Bad Saarow, kie jam okazis kelkaj tre efikaj kaj altkvalitaj internaciaj seminaroj kun partoprenintoj el 15 landoj.

Invitataj precipe estas historiistoj, sociologoj, aktivuloj aŭ aliaj kleraj esperantistoj okupi-

ĝantaj pri la temoj supre tuŝitaj. La seminario okazos en la ripozloko Bad Saarow, kiu situas ĉirkaŭ 100 km oriente de Berlino.

Ĝin organizas Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), DDR-1080 Berlino, Charlottenstr. 60, telefono 220 29 91.

GDREA subvencias la seminarion je 75 %. Ĉiu partoprenanto devas pagi simbolan kotizon en la valoro de 100 germanaj markoj. la sumo estas pagata surloke. Limdato por aliĝo: 30.9.1986. Petu kompletan informilon kaj aliĝilon de GDREA.

## NYA ÅRS AVGIFTER 1987

SEF:s årsmöte i Örebro beslöt att höja årsavgifterna för 1987:

Direktansluten medlem	100:-
Direktansl. fam.medl(utan tidning)	50:-
Direktansluten ungdomsmedlem	50:-

Årsavgiften insättes på SEF:s postgiro-konto 2012-3.

## Deziras korespondi

**Antoni Stukus**  
ul Gławackiego 39/60  
PL-39-200 Dsbica  
woj Tawnow  
Pollando

Deziras korespondi kun svedoj. Havas 42-jarojn, kolektas i.a. turismajn prospektojn, ilustritajn revuojn.

**Wiodarczyk Waldemar**  
ul Ogrodowa 8  
PL-24-800 BEIZYCE  
Pollando

26 jara instruisto deziras korespondi kun esperantistoj el Skandinavio. Interesoj i.a. sporto, ekzotikaj landoj, vojaĝoj. Studas en politekniko.

**Karikó Kalázs**  
Komárom  
Madách Imre út 4/b 2/1  
2900  
Ungern

Volas korespondi svedlingve. Lia intereso estas psikologio kaj turismo kaj li havas dudekok jarojn.

**Jan Malec**  
ul Jasna 14 a  
PL-44-100 GLIWICE  
Woj Katowice  
Pollando

22-jara komencanto. Intereso: distra muziko, fotado, turismo kaj ĉiutaga vivo de homoj en aliaj landoj

**Józef Zajac**  
ul Jeleniogórska 2a  
PL-58-532 KOSTRZYCA  
Pollando

40-jara ĝardenisto, komencanto, deziras korespondi pri floroj, kreskaĵoj kaj fotado. Volas interŝanĝi poŝtmarkojn.

**Ryszard Balicki**  
Grochowice 24  
PL-67-240 KOTKA  
Pollando

Kolektas esperantorevuojn kaj bultenojn

**László Csányi**  
Nagyörvény u 79  
H-6600 SZENTES  
Hungario  
Studas matematikon kaj fizikon  
Interesiĝas pri muziko.

**Mohammed Mehry**  
st Ansarie, st 5 MoAllem  
n 32, c.o. 45158 ZANJAN  
Irano

**Ursula Janworska**  
Str Wyczokkowskiego 4  
PL-07-300 OSTROW MAZ  
Pollando

26-jara komencanto. Interesoj i.a. turismo kaj sporto, muziko kaj danco. Speciala intereso pri popolo medicino.

## Televizia esperanto-kurso en Ĉinghaj

Ekde januaro ĉi-jare la Ĉinghaja Televida Stacio telesendas Esperanto-kurson de la 19-a ĝis kvarono post la 19-a. Tio estas la unua televizia programo de Ĉinio pri Esperanta instruado.

## Kiel diri?

(Ur Lentaigne: Praktika Esperanta Frazologio, Kr 29: -)

### DORMI

"Kiel oni sternas, tiel oni dormas".

1. Dormo profunda, peza, eterna.

Dormi profunde: kiel gliro, marmoto; unuokule, lepore, delikate kiel leporo; per peza dormo. Dormi ŝtonan dormon, la dormon de justuloj.

Estas la horo, kiam la infanoj iras dormi. Luli bebon al dormo. Bonan dormon, bonan sonĝon/ Ekspedi la infanojn en la liton.

Oscedi. Somnoli. Esti en duondormo. Senti sin dormema. Bezoni dormi. Palpebroj pli kaj pli pezaj. Apenaŭ teni la okulojn malfermitaj. Ŝiaj okuloj preskaŭ fermiĝas de dormemo, de laciĝo. Lukti kontraŭ dormo. Cedi al dormo. De tri tagoj mi ne fermis la okulojn. Avidi ripozon. Iri dormi. Siesti. Subpremata de dormo. Enŝovi la kapon en kusenon. Dormego falis sur ilin.

5. Dormi ĉe malfermitaj fenestroj. Havi trankvilan dormon. dormi kapo ĉe kapo. Dormi kaŭre en la lito.

Ronki per longaj tiroj. Paroli dum la dormo. Somnambulo. Sonĝi. (Interpreti sonĝojn. Malaperi kiel malbona sonĝo). Dormo donas konsilojn.

Tradormi la nokton. Tranokti en iu loko, sub libera ĉielo/ Resti sendorme tutajn noktajn horojn. Sendorma nokto. Pasigi la nokton maldorme. Ĉu vi satdormis? Vekiĝi de bruo. Perdi la dormon. Ŝiri iun el la dormo. Rabi la dormon.